

6/2021

Novembro  
Decembro

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ KELI en Legnica
- ★ La plej bela domo de la mondo...
- ★ Pastro esperantisto Leszek Solakiewicz

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodz@wp.pl](mailto:rk-lodz@wp.pl)

## **Adreso de redakcio**

Robert Kamiński, ul. Kwiatowa 1/3  
94-227 Łódź

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, Andrzej Sochacki,  
Magdalena Tatara, Adam Wilkus,

## **ABONOJ**

La abono por 2022 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 58 zlotoj  
eksterlando - 20 eŭroj  
Cifereca (pdf)  
Pollando - 27 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.  
Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: peaa-v;  
Detaloj trovigas ĉe:  
<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Helena Biskup

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la autoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Reproso kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj  
64 2130 0004 2001 0558 6110 0001  
liberan monsumon priskribu  
per vorto "Darowizna"



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

## Enhavo

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>Estraro informas</b>	
<i>Ĉefa Estraro de PEA, Koran dankon al donacintoj</i> .....	3
Provizora programo de la 39-a Pola Esperanto-Kongreso en Łódź .....	4
<b>Eventoj</b>	
<i>Paulina Jaworska, Urbo kaj akvo</i> .....	4
<i>Bożena Kocyk, Legnica - kelkaj personaj rememoroj</i> .....	6
<i>Teresa Nemere, KELI en Legnica</i> .....	9
<b>Mojose</b>	
<i>Pola Esperanto-Junularo, JES 2021-2022 ne okazos</i> .....	11
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Roman Dobrzyński, Monto sen montoj</i> .....	12
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Povilas Jegorovas, Baltiaj Esperanto-Tagoj en Klajpedo</i> .....	15
<i>Robert Kamiński, La plej bona domo de la mondo staras proksime al Kraków</i> .....	16
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Jadwiga Zakrzewska, La kuracado en Cieplice</i> .....	18
<b>Homoj</b>	
<i>Paweł Nowak, Pastro esperantisto Leszek Solakiewicz</i> .....	20
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de E-ta Gramatiko, Lokaj rolvortetoj Antaŭ (kaj malantaŭ) – 2</i> .....	23
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Mark Twain, La Homo</i> .....	24
<i>Roman Dobrzyński, Metiistoj</i> .....	26
<b>Saĝulaj pensoj</b>	
<i>Anton Oberndorfer, Streso kaj blankaj haroj</i> .....	26
<b>Leterkesto</b>	
<i>Katalin Kovats, Helpu al edukado.net - naskiĝtaga mesaĝo</i> .....	27
<i>Jerzy Dryja, Du novaĵojn el Varsovio</i> .....	28
<b>Kalendaro de Esperanto-aranĝoj</b>	
<b>Diverse, facile, bonguste</b>	
<i>Bert Boon, Gratেনita supo kun blankigita cikorio</i> .....	30
<b>Oni eldonis</b>	
<i>Valentin Melnikov, Legu kaj ridu!</i> .....	31
<b>Forpasis</b>	
<i>Mikołaj Prokopowicz</i> .....	32
<b>El la fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki, 9-aj E-taj Tagoj de Staszów, Ripoza renkontiĝo, AIS sesio</i> .....	33
<b>Esperanta gazetaro</b>	
<i>Bert Boon, “Esperanta Numismatiko”</i> .....	36
<b>Zamenhof/Esperanto-Objektoj</b>	
<i>Robert Kamiński, Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 6</i> .....	37

## Redaktoraj vortoj

### Estimataj legantoj

Ni proksimiĝas al la fino de la sekva, malfacila jaro 2021. La kronavirusa pandemio daŭre malfaciligas nian vivon kaj verŝajne ni devos akcepti ĝiajn venontajn ondojn por la longa tempo. Ni devas alkutimiĝi al la vivo en la nova realo kaj venki ĝiajn postajn malfacilaĵojn trankvile kaj kun espero.

La tempo tamen pasas kaj la organizaj aferoj de la Pola Esperanto-Asocio ne povas atendi pli bonan estontecon. Venontjare junio, dum la Pola Esperanto-Kongreso, okazos la Ĝenerala Kunsido de PEA-membroj. Tiu ĉi renkontiĝo estas duoble grava por nia organizaĵo. La kunveno estos elekta kaj raporta.

Dum la Ĝenerala Kunveno ni planas solvi kelkajn gravajn problemojn. Ni certe voĉdonos por la ŝanĝoj en la statuto de PEA, kiu estis akceptita antaŭ naŭ jaroj. La funkciado de PEA tra tiuj jaroj montris, ke la statuto devas esti parte modernigita. Kelkaj el ĝiaj reguloj estas ambiguaj. Ni jam petis la PEA-anoj sendi proponojn por korektoj de la statuto. Venis ne multaj kaj pro tio la prilaboron de la ŝanĝoj plenumos ĉefe la Ĉefa Estraro.

La malpliĝanta nombro da membroj postulas alĝustigi la statuton al la nuna realeco. Ni volas ĝisfunde kontroli la nombron da membroj de nia organizaĵo. Ni volas verajn membrojn, ne statistikajn.

Aliaj gravaj aferoj estas la elektoj al la nova Ĉefa Estraro kaj la fikso de novajn membrotizojn.

Ĝis la fino de januaro ni atendas pliajn proponojn por korektoj de la statuto. En la sekvaj monatoj, la Ĉefa Estraro prilaboros la kolektitajn projektojn kaj prezentos ilin al la membroj. Ĉi-tiujn decidojn povas akcepti nur la Ĝenerala Kunveno.

Mi invitas vin legi Polan Esperantiston, kiun vi tenas en viaj manoj. Mi esperas ke ĉiuj el vi trovos en ĝi interesajn informojn.

Bonvolu memori pri reabono de nia revuo en la venonta jaro.

*Robert Kamiński*

**ĈU VI ABONIS POLAN  
ESPERANTISTON POR 2022?**



*Ĉefa Estraro de PEA*

## Koran dankon al donacintoj


La Ĉefa Estraro de la Pola Esperanto-Asocio kore dankas ĉiujn donacintojn, kiuj donacis al PEA 1% de sia imposto en 2020. Danke al la fondaĵo FaniMani, aganta kiel peranto en ĉi tiu ago, PEA ricevis 2,276 zlotojn.

Ni ankaŭ dankas la sekvajn donacantojn, kiuj, farante aĉetojn en interretaj vendejoj, donacis al PEA malgrandan procenton de siaj kotizoj. Ĉi tiu formo de la financa subteno por PEA ankaŭ eblis danke al la fondaĵo FaniMani. En 2021, oni kolektis 260 zlotojn.

Konforme al la leĝo, ni povas elspezi la kolektitan monon por statutaj celoj, tio estas agoj popularigantaj la lingvon Esperanto - presado de revuoj, flugfolioj, gvidiloj, lernolibroj kaj libroj por propagandi Esperanton kaj la Esperanto-movadon. La regularo de la fondaĵo devigas nin prezenti la celojn, por kiuj la kolektitaj pagoj estos uzataj.

Ni petas esperantistojn kaj subtenantojn de la Esperanto-movado sendi ĝis la fino de marto proponojn kiel uzi tiujn fondusojn por celoj konformaj al la statuto de PEA.

En la nomo de ĈE Robert Kamiński



## Provizora programo de la 39-a Pola Esperanto-Kongreso en Łódź dum tagoj 23-26.06.2022

- 23.6.2022 ĵaŭdo** – 8:00 – 18:00 Tutaga ekskurso tra ĉirkaŭaĵo de Łódź.  
19:00 – vespera renkontiĝo
- 24.6.2022 vendredo** - 10:00 – Malfermo de la kongreso, prelegoj.  
14:00 – 15:00 – manĝopaŭzo  
15:30 – 18:00 – posttagmeza programo, vizitado de la urbo.  
18:00 – 21:00 – vespera arta programo
- 25.6.2022 sabato** - 9:30 – 14:30 Ĝenerala PEA-kunsido (raporta kaj elekta).  
14:30 – 16:00 – manĝopaŭzo  
16:30 – 18:00 – posttagmeza programo, ebla E-diservo  
18:30 – 21:00 – vespera arta programo
- 26.6.2022 dimanĉo** 10:00 12:00 - prelegoj, resumo de la kongreso, fermo.  
13:00 – 14:00 – manĝopaŭzo,  
14:00 - vizitado de la urbo

**Kongresejo:** Kulturdomo de Łódź, ĉe la str. Traugutta 18, **Tranoktejo:** PTSM-Tranoktejo ĉe la str. Zamenhofa 13. **Distanco** inter la tranoktejo kaj la kongresejo 1,5 km – piede 19 minutojn, per aŭto 5 min.

## Eventoj

*Paulina Jaworska*

### Urbo kaj akvo

Ĉi-jare, dum „Esperanto sur la strando” - la aranĝo organizata jam ekde naŭ jaroj en septembro de Triurba Esperantista Asocio „Toronto” - la ĉefa temo estis: „Urbo kaj akvo”. Kial tia temo? La ideo venis al mia kapo dum la vizito de la urba akvorezervujo „Malnova Sobieski”, tre interesa teknika antikvaĵo, kiu ĝis la 90-aj jaroj de la dudeka jarcento estis grava parto de la urba akvoproviza sistemo. Tuj evidentiĝis, ke ĝi ne estas ununura, vidinda tiutipa objekto, kaj ke la historio de akvo en Gdańsk estas ege interesa.

En la historio de la urbo dufoje okazis grandaj saltoj en la disvolviĝo de la akvosistemoj, kiuj tiutempe estis escepte modernaj: la unuan fojon en la 14-a jarcento, dum la tempo de la Ordeno de Kruckavaliroj, kaj la duan fojon en la dua duono de la 19-a jarcento, kiam Gdańsk estis parto de la reĝlando Prusio.





Estis la komenco de la 14-a jarcento. Ekde 1308, en la urbo kaj kastelo regas kruckavaliroj. La loĝantaro kaj kastelanoj bezonas freŝan trinkakvon. Diversaj metiejoj bezonas energifonton. La marĉa rivero Motława estas malpura kaj pigra. Kelkaj naturaj torentoj ne sufiĉas al la kreskanta urbo.

Por plibonigi la akvan provizon, oni decidis uzi la proksiman riveron Radunia, rapide fluantan kaj riĉan je akvo. Proksime al la urbeto Pruszcz Gdański estis konstruita kluzo. Oni devis fosi kanalon longan pli ol dek tri kilometrojn kaj subteni ĝin unuflanke per remparo. Poste, parto de la akvo de la rivero Radunia estis direktita al la kanalo Radunia, kies konstruado finiĝis en 1354. La akvo el la kanalo kaj ankaŭ el la Torento Siedlicki estis sprite liverata per lignaj tuboj al 594 urbaj putoj.

Ĉe la kanalo estis konstruitaj muelejoj kaj aliaj fabrikoj, funkciigataj per akvo: forĝejoj, oleejoj, segejoj kaj aliaj. Sur la arterfarita insulo, kreita de la forko de la kanalo Radunia, ekde la jaro 1350 funkciis „La Granda Muelejo”, en kiu ĝis la dua mondmilito oni produktis farunon. Nuntempe oni povas viziti tie la Muzeon de Sukceno, kiu antaŭ nelonge ŝanĝis la sidejon.

La akvo, uzita en la urbo, ne estis purigata kaj kloakaĵoj estis elverŝataj en la riveron Motława. Tia sistemo funkciis kvincent jarojn!

En la 19-a jarcento, la sanitara sistemo estis tre malbona kaj okazis en la urbo ripetigantaj epidemioj. Dum 1831, pro ĥolero, mortis pli ol mil urbanoj. Gravaj investoj devis esti faritaj. La iniciatinto de la moderna akvosistemo estis la superurbestro Leopold von Winter, kaj la ĉefprojektisto – la inĝeniero pri konstruado Eduard Friedrich Wiebe.

La novkreita sistemo estis la unua moderna, kompleksa sistemo en Eŭropo, kiu liveris trinkakvon, forigis kloakaĵojn kaj purigis ilin!

Trinkakvo estis ĉerpita el subtera fonto, sekve kolektita en rezervejoj (Akvorezervejoj „Malnova Orunia” kaj „Malnova Sobieski” nun estas viziteblaj somere kaj certe vizitindaj). Poste la akvo estis distribuata en la urbo. La kloakaĵoj estis eligataj per specialaj kanaloj al la pumpejo kaj de tie al la biologia purigejo. La tuta sistemo estis projektita por 100 mil homoj kaj bone funkciis, uzata eĉ de duoble pli granda loĝantaro.

La unua kanaliza sistemo de Gdańsk estis objekto prototipa en Eŭropo, kopiita kadre de similaj alilokaj investaĵoj. Pri la bona kvalito de materialoj de la 19-a jarcento, same kiel pri la efika realigado de la akvolinio, atestas la fakto, ke post la riparado de la postmilitaj detruoj, la ĉefa tubokondukilo estas plu ekspluatata kaj ĝi certe, senprobleme, funkcios ankoraŭ multajn jarojn. Tamen, ekestis la neceso pli rapide kaj pli efike pritrakti kloakaĵojn, do en la dudeka kaj la nuna jarcento, oni devis esti faritaj pluraj investoj.

Ĉu la temo „Urbo kaj akvo” estis sufiĉe interesa por nia aranĝo? Ĉiukaze, kiam ni preparas nian feston „Esperanto sur la strando”, ni volas montri al niaj gastoj vidindaĵojn el Triurbo. Ni serĉas ankaŭ tiujn lokojn, kiuj ne estas sur la unuaj paĝoj de gvidlibroj, prezentas liajn historion kaj gravajn detalojn. Mi aŭdis klaĉojn, ke al la partoprenantoj plaĉis nia ĉi-jara aranĝo.



---

*Bożena Kocyk*

## Legnica - kelkaj personaj rememoroj

La unuan fojon mi partoprenis en la Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, do kun scivolemo mi observis la organizadon kaj funkciadon de la kongreso. Jam dum la interkona vespero plaĉis al mi la ideo de interkonatiĝo. Agnes kunligis en parojn - unu polo kaj unu eksterlandano. Post kelkaj minutoj, ambaŭ personoj rakontis al ĉiuj pri la partnero.

Estante en Legnica, ni promenis en la urbo kun la loka gvidantino, kiu montriĝis la patrino de la fama pola aktoro Tomasz Kot.



Kion oni scias pri Legnica?

La unua grava historia evento estas la batalo en la 1241 kontraŭ mongoloj, kiuj tiam transŝovis sin tre malproksimen en sia okcidenta ekspansio.



Muro en Legnica. Foto Grzegorz Spała

La dua grava, historia tempo, pli nuntempa, estas ĉirkaŭ 50-jara periodo de okupacio, fare de la Rusa Armeo. Dum la jaroj 1945-1993 rezidis tie potenca, soveta armea garnizono kaj la komendantejo de la Norda Armea Grupo havis tie sian sidejon. Ĝuste tie estiĝis strategioj por nia regiono. De tie la Rusa Armeo atakis Ĉeĥoslovakion, en aŭgusto de la 1968-a jaro.

Rusoj havis eĉ sian propran flughavenon, de kie, sen iu ajn kontrolo, estis kontrabanditaj al Rusio aŭtoj, ŝtelitaj en Okcidenta Eŭropo.

Nun en Legnica loĝas 99 mil da loĝantoj. En la 1946-a jaro estis 17 mil poloj, 13 mil germanoj kaj 60 mil rusoj. Dum la tuta restado rusoj pagis nenion por loĝado, elektro, akvo ktp. Post foriro de rusa armeo la urbo devis zorgi pri preskaŭ 370 loĝkonstruaĵojn kaj preskaŭ 420 neloĝkonstruaĵojn, inkl. flughaveno.

La etoson de la „rusa” urbo bone priskribas, konata kaj honorigita dum la Festivalo en Gdynia, filmo de Waldemar Krzystek „Malgranda Moskvo”.

Iomete pri ekskursoj.

Komence Lubiąż. La postcisterciana, monaĥeja komplekso (nomata la ĉefverko de silezia baroko) estas la dua plej granda sankteja objekto en la mondo (La unua estas la Eskurial-palaco kaj monaĥeja komplekso en Hispanio). La surfaco de ĝia tegmento havas ĉirkaŭ 2,5 hektarojn kaj la konstruaĵo Havas pli

ol 600 fenestrojn.

Tiuj partoprenantoj, kiuj antaŭe vizitis la Kirkojn de Paco en Jawor kaj en Świdnica, havis la okazon denove admiri tiujn unikajn, protestantajjn, lignajn sanktejojn. Tio, kio plej logas la rigardon de tiuj objektoj, estas la eksterordinara, riĉe ornamita kaj pentrita interno, kiu kontrastas kun tipe severa karaktero de protestantaj kirkoj.



Por kompreni la fenomenon de la **Świdnica sanktejo**, oni necesas referenci al la historio. La instruoj de Martino Lutro rapide venis al Świdnica, allogante plimulton de ĝiaj loĝantoj. Tamen, post la Tridekjara Milito (1615-1645) Silezio troviĝis sub la regado de katolikaj Habsburgoj, kiuj aplikis la regulon „Cuius regio eius religio” (Kies reganto, ties religio). Finfine la konsento de regantoj por konstrui protestantajjn sanktejojn estis donita kondiĉe, ke ili troviĝu ekster la muroj de la urbo kaj estu konstruitaj el malfirmaj materialoj kiel argilo, sablo, pajlo kaj lignopecoj. Tamen, la traboforma konstruaĵo evidentiĝis temporezista. Por bonvenigi multajn religiulojn, estis planitaj internaj loĝioj, do la preĝejo povas enteni sep mil personojn, inkluzive tri mil sidantaj.

Al la ŝtorma historio de Bolesławiec mi volus aldoni napoleonajn militojn. En la jaroj 1812 kaj 1813 trasmarsis la urbon la franca armeo. Postkurante ĝin, trairis la rusa armeo. Ĉi tie, la 28-an de aprilo, en la jaro 1813, mortis la rusa ĉefkomandanto, feldmarŝalo Mihail Kutuzow.

Resume - la ĝojo, ke homoj povis denove renkontiĝi kaj bona etoso de la komenca, interkona vespero ĝis la fina, adiaŭa vespero sufiĉas, por ke mi rekomendu partoprenon en la sekvaj KELI kongresoj, ekzemple en Domaszek en Hungario, en la jaro 2022.

---

*Teresa Nemere*

## KELI en Legnica

La 70-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazis ĉi-jare en la mezgranda, interesa urbo Legnica, en la sudokcidenta parto de Pollando, dum la 7-a-14-a de aŭgusto 2021. Pro la necerta, pandemia situacio, alvenis nur nemultaj KELI-anoj (ĉeĥoj, franco, hungaroj, rumanoj, slovako, svedo) kaj inter multaj poloj, plimulto estis katolikoj, do ĉi-jare tio ne estis nur KELI kongreso kaj oni decidis nomi la aranĝon “Kristana Esperanto-Kongreso”.

La Loka Kongresa Komitato, lerte gvidata de Teresa Pomorska, kiun formis la anoj de Silezia Esperanto-Asocio el Wrocław: Bogdan Dembiec, Ewa Tracz kaj Aneta Wacowska, zorgis pri la organizaj aferoj, kontaktoj kun ekleziaj kaj urbaj aŭtoritatoj, kreis riĉan kulturalan kaj turisman programon. Pri la esenca programo de la kongreso decidis kaj plej parte gvidis ĝin la ĉeestantaj estraranoj de KELI: la prezidanto, Philippe Cousson, Agnes Raczkevny-Etvos, Bengt Olof Aradsson kaj la animzorganto de polaj esperantistoj, la pastro Roman Gmyrek.



**La kongresejo** troviĝis en la impona konstruaĵo de la Supera Teologia Seminario, konstruita komence de la 20-a jc kiel lernejo por riĉaj knabinoj, situita proksime al la urbocentro. Tie, do, ni havis, por dispono, komfortajn ĉambrojn, manĝosalonon, prelegejojn, ejon taŭgan por koncertoj kaj kapelon por sanktaj mesoj. Tie ĉiutage okazis la vigla, kongresa vivo: matenaj kaj

vesperaj preĝoj, kantado, sanktaj mesoj, ekumenaj diservoj, prelegoj, lingvolecionoj, koncertoj, amuzvesperoj. Kun ĝojo mi observis, ke la partoprenantoj aktivis dum la renkontiĝoj, prezentante proprajn prelegojn kaj temojn por diskuto, variajn programerojn por adiaŭa vespero, elektante, en la preparitaj por ĉies uzo dikaj kantaroj “Adoru”, la ŝatatajn kantojn. Por

kongresanoj, kiuj nur komencis lerni Esperanton, dum la antaŭtagmezaj prelegoj, okazis E-kurso, ĉarme gvidata de Jolanta Kieres el Nowy Sącz.

Surprizaj kaj neforgeseblaj estis niaj ekskursoj. Dimanĉe, dum la unua, kiam ni vizitis la grandiozan komplekson de la postcistersiana monaĥeja komplekso en Lubiąż, okazis oficiala malfermo de la Kongreso. En la impona *Princa Salono* esperantlingve salutis nin la luterana episkopo Waldemar Pytel kaj muzikis la kvarteto “Kamerata Autentik”.

Dum la sekvontaj tagoj ni vizitis interesajn lokojn: la malnovan urbon Świdnica, situantan piede de la montaro Sudety, kie, krom historiaj interesaĵoj, ni vizitis la faman, protestantan *Kirkon de Paco*, kiu estas taksata kiel la plej granda ligna kirko en Eŭropo. Tie denove ni renkontis la episkopon W. Pytel. Danke al li kaj kune kun li ni povis aŭskulti en la impona, barokstila interno de tiu preĝejo, barokstilajn muzikkomponaĵojn plenumite de la jam konata muzikgrupo “Kamerata Autentik”.

Sekve, ni vizitis la malnovan urbon Jawor, kies centro estas trezerorejo de historiaj malnovaĵoj kaj en ĝi troviĝas la dua, konservita en tiu regiono, evangeliana *Kirko de Paco*, konstruita simile kaj preskaŭ samtempe, kiel tiu en Świdnica. Ĝi havas tre interesan, barokstilan internon, riĉe ornamita, sed ne tiel pompe, kiel en Świdnica.

Dum la lasta ekskurso ni povis viziti Bolesławiec, la urbon kun longa kaj tre riĉa historio, kiu atingas la paganan tempon. Dum la 2-a mondmilito Bolesławiec estis grandparte ruinigita kaj post la milito – kiel la unua urbo en Malsupra Silezio ĝi estis zorgeme rekonstruita kaj renovigita. Nuntempe ĝi estas fama pro la entrepreno de ceramikaĵoj “Bolesławiec”- unu el la plej grandaj produktoj de la manfaritaj kaj mane ornamitaj, laŭ la unika stampa tekniko, tabloj ceramikaĵoj. Ni, kompreneble, vizitis la produktojn, kie gvidis nin simpatiaj fakulinoj. Ne malmultaj kongresanoj sukcesis pligrandigi siajn sakojn, aĉetante ceramikajn memoraĵojn en la funkcia tie vendejo.

Meritas noti, ke la organizantoj certigis por ni, dum ĉiuj ekskursoj, bonajn, kompetentajn gvidantojn kaj la ĉeestanta slovako Pavol Petrik brile tradukis al Esperanto iliajn pollingvajn rakontojn.

Riĉa kaj ĝojige interesa estis la kulturprogramo. Gajajn amuzvesperojn



ĉarme gvidis Agnes el Hungario. Ĉeestis la kongreson Wojciech Ławnikowicz - konata kaj ŝatata en nia medio, nevidanta muzikisto, kiu, imponvoĉe fortigis nian kantadon kaj vendrede vespere, akompanante sin per gitaro, prezentis sian propran kantprogramon. Samvespere, la konata pola esperantistino - poetino Halina Kuropatnicka-Salomon legis siajn versaĵojn kaj poste gvidis, organizitan speciale por la kongreso, recitalon de la nevidanta, eminenta basbaritono Armand Perykietko. Koncertis por ni ankaŭ du junaj, videble talentaj, pianistinoj - Julia kaj Aleksandra Czajka.

En la lasta sankta meso, okazinta vendrede en la kongresa kapelo, partoprenis la katolika episkopo de Legnica - Andrzej Siemieniewski, kiu salutis kaj adiaŭante benis la ĉeestantajn kongresanojn.

La kongreso finiĝis per la ekumena diservo, gvidata de Philippe Cousson kaj la pastro Roman Gmyrek kaj la vigla kaj gaja adiaŭa vespero, kies programon kreis improvizitaj programeroj de la ĉeestantoj.

Kutime, la bona etoso karakterizas la esperantistajn aranĝaĵojn. Partopreninte jam multajn Esperanto-eventojn, kun ĝojo mi povas resumi, ke la kongreso en Legnica estis bone organizita, enhave riĉa kaj havis iun specialan, amikan etoson. Dankon al la organizantoj kaj al ĉiuj kreantoj de la bona programo kaj la bona agordo.

## Mojose

*Pola Esperanto-Junularo*

### JES 2021-2022 ne okazos

Kara aliĝinto al JES 2021/2022, bedaŭrinde, ni havas tre malgajan anoncon por vi:

Kiam printempe ni komencis varbi por JES 2021/2022, ni esperis kaj anoncis, ke "ni povos jam denove renkontiĝi kiel antaŭe, por plej senzorge festi finon ne nur de la jaro, sed ankaŭ la finiĝon de tre malfacila tempo". Tiun promeson nun ni ne plu povas teni.

La pandemia situacio en Germanio subite kaj draste malboniĝis dum la lastaj semajnoj. Precipe por la periodo ĉirkaŭ la Kristnasko kaj la Novjaro, epidemiaj modelistoj nun antaŭvidas nombrojn de enmalsanulejigoj pro KOVIM-19 pli altajn ol iam ajn antaŭe. Plistriktigoj de kontraŭvirusaj mezuroj ĝis la fino de decembro en la tuta lando, inkl. kvaranten-devigoj por vojaĝantoj al Germanio, jam tre verŝajnas.

Pro ĉio ĉi, kaj ankaŭ ĉar ni ne pretas riski la sanon de niaj partoprenantoj (ĉu vakcinitaj, ĉu ne-vakcinitaj), ni, kiel organiza teamo, kun pezaj koroj, decidis nuligi la eventon. JES 2021/2022 en Lutherstadt Wittenberg ne okazos.



Se vi jam antaŭpagis parton aŭ la tuton de via aliĝkoto, vi ricevos ĝin de ni sur via bankokonto, dum la sekvaj tagoj.

Ĉi-jare, ni ne planas realigi anstataŭan, virtualan eventon. Tamen, ni ja konsideras la ideon denove instigi kaj kunordigi "lokajn JES-erojn", do etajn, lokajn kunvenojn de privataj gastigantoj kaj gastigatoj, ĉirkaŭ la silvestra/novjara semajnfino. Pri tio, ni baldaŭ ĝisdatigos vin pere de nia retpaĝo kaj niaj ceteraj informkanaloj.

Amike kaj triste, via JES-teamo

## Raportoj, rakontoj

*Roman Dobrzyński*


### Monto sen montoj

Temas pri Monto, kiu estas nomo de urbo sur la plata tereno de Malsupra Silezio, kie mankas montoj. Pole ĝi nomiĝas Góra. Treege malnova loko. Menciis ĝin la papo Hadriano en sia buleo en la jaro 1155 kaj cent jarojn poste la princo Henriko el la Piast-dinastio donis al ĝi urbajn rajtojn. Tiun ĉi mezepokon konfirmas la gotika Turo, kiu estas bone konservita postrestaĵo de la urba fortikaĵo. Ravas ankaŭ malfrugotika preĝejo, kiun patronas sankta Katarino de Aleksandrio. Konservigis la mezepoka urbocentro, tra kiu etendiĝas la Zamenhof-strato. Ĝia plilongiĝo estas la Hirszfild-strato. Kia koincido! Ludwik Hirszfild, la fama bakteriologo, malkovrinto de „sangogrupoj”, loĝis najbare kun Ludwik Zamenhof en la paroĥa domo de Ĉiuj Sanktuloj en la Varsovia Geto. Temas pri la nepo de la kreinto de Esperanto, kiu post la milito eknomiĝis Ludoviko Zaleski-Zamenhof. Sed estis lia avo, kiu instigis min veturi al Góra.

Teresa Sibilak, nome de tieaj esperantistoj invitis min prelegi pri Esperanto al gestudentoj de la Universitato de Tria Aĝo. Mia alia tasko estis prezenti la filmon „Esperanto-urbo”. La titolo de tiu ĉi filmo estas oficiala kromnomo de Herzberg am Harz, kiu situas en la centro de Germanio apud la belega Harz-montaro. Góra kaj Herzberg am Harz „ĝemeliĝis”. Teresa Sibilak sciigis min kiel komenciĝis iliaj rilatoj. Jen la historie kurioza afero. En 1945 laŭ la Potsdama Traktato la okcidenta limo de Pollando estis ŝovita ĝis la rivero Odro. La germanaj loĝantoj devis forlasi siajn hejmojn kaj ilian lokon okupis poloj forpeltitaj el la terenoj trans la rivero Bug. Tion suferis la urbo Guhrau, nomita poste Góra.

La germanaj forpelitoj setlis grandparte en kaj apud Herzberg am Harz. Inter ili estis esperantistoj, kiuj – post la definitiva reguligo de rilatoj inter Germanio kaj Pollando – iniciatis kontaktojn inter amabaŭ urboj en 1993.

Sed iliajn rilatojn ĝenis la lingva diverseco. Tiun ĉi „muron de miljaroj” rompis esperantistoj. En la jaro 2005 okazis oficiala decido uzi Esperanton kiel la komunan lingvon. La afero brile evoluis kaj post unu jaro, laŭ la propono de la urbestro Gerhard Walter la urba konsilantaro de Herzberg am Harz decidis aldoni la kromnomon „Esperanto-urbo”. Tiu ĉi fakto treege interesis min. Mi veturis al Herzberg kaj trovis en la apudurba tendaro germanajn kaj polajn gejunulojn, kiuj kune lernis Esperanton kaj tuj ĝin sukcese uzis.



Malfrugotika preĝejo, kiun patronas sankta Katarino de Aleksandrio

Mi imagis grandegan ĝojon de Ludoviko Zamenhof, se li povus vidi, ke gejunuloj de Germanio kaj Pollando amike interparolas per lia lingvo. Mi faris tiam filmon, kiu prezentis kortuŝajn scenojn de spontana amikiĝo kaj titolis ĝin „Intermonta amikeco”, ja en ambaŭ nomoj de tiuj ĉi urboj estas la vorto „monto”. Tiaj renkontiĝoj okazis preskaŭ ĉiun jaron alterne en Góra aŭ Herzberg. En la germana urbo fondiĝis Interkultura Centro Herzberg gvidata de la germano Peter Zilver kaj la hungarino Zsofia Korody. Mi plurfoje vizitis la Esperanto-urbon kaj filmis ankaŭ la Harz-montaron, en kiu abundas

belegaj lokoj kaj tradiciaj kulturaj aranĝoj kun la plej grava fruprintempa Festo de Sorĉistinoj. La nomo mem – Esperanto-urbo logas eksterlandajn esperantistojn, interalie polojn. Teresa kaj Zygmunt Libersas aĉetis malnovan, forlasitan hotelon. Ili memstare renovigis ĝin kaj funkciigis kun la ŝildo „Esperanto parolata”. Tiu ĉi hotelo fariĝis ĉefa bazo de la feriaj renkontiĝoj de polaj kaj germanaj gejunuloj. Flanke de Góra elstare agis Lidia Nowak. En la jaro 2016 okazis la jubileo de la kromnomo „Esperanto-urbo”. Mi filmis ĝin kaj aldonis al la menciita filmo „Esperanto-urbo kaj...” La dekjaran jubileon ĉeestis gravuloj de Herzberg kaj la urbestro de Góra Irena Krzyszkiewicz. Gejunuloj el ambaŭ urboj kantis en Esperanto la „Odon al Ĝojo”.



Tiu ĉi filmo neniam estis prezentita en Góra, finfine ĝia **seanco okazis la 23-an de novembro 2021**. Mi miris, ke gejunuloj el Góra ne spektis ĝin, kvankam ili estis ĝiaj protagonistoj. Surloke mi eksciis, ke ilia urbo dum tiel nomata „komunismo” prosperis danke al siaj grandaj ŝtataj bienoj, ĉirkaŭ kiuj kreiĝis multaj entreprenoj, kiel mueliloj, grendeponejoj, agrikultura maŝinparko, bovaroj, laktejoj, buĉejoj, veterinara servo ktp. La politikaj kaj ekonomiaj transformiĝoj komence de la jaro 1990 kaŭzis kompletan likvidon de la ŝtataj agrikulturaj bienoj. Rezulte kolapsis la tuta infrastrukturo. La urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon ekregis la manko de laborebleco. Góra ĉiam pli malriĉiĝas, ĝia loĝantaro malkreskas.



Tiuj faktoj ankaŭ tuŝis Esperanton. Oni instruas ĝin al gejunuloj, sed tio evidentiĝas la „laboro de Sizifo”. Ĉar junaj homoj, fininte sian mezan edukadon formigras eksteren studi aŭ serĉi laboron kaj ne plu revenas. Sed la lokaj esperantistoj ne kapitulacas, ili „fosas sian sulkon”<sup>1</sup>.

<sup>1</sup> La fama eldiro de Theodor Cart okze de la skismo en la jaro 1907. Vidu: *Vortoj de Profesoro Th. Cart. Pro Esperanto* – Vieno, 1990, p. 37.

*Povilas Jegorovas*

## Baltiaj Esperanto Tagoj en Klaipėdo

Post la dujara, deviga pandemia paŭzo, la 56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio la 9-17-an de Julio, 2022, ĉi-foje en la litovia havenurbo Klaipėdo, apud la Balta Maro, en la universitato de Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio invitas Vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. La aranĝo estas dediĉata la la 770-jariĝo de Klaipėda kaj al la 135-jariĝo de Esperanto.

BET-56 havas aŭspicion de la Universala Esperanto-Asocio. La alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de Klaipėda Vytautas Grubliauskas.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa bulteno pri BET-56 ĉi-tie: <https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/>. Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie: <https://mallonge.net/gl>

BET-56 havas ĉiuf flankan subtenon kaj helpon de la urbaj instancoj de Klaipėda kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj de Litovio.

Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo.

BET-56 estos vere altnivela internacia, esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La programo, kiel kutime dum BET-oj, estos tre varia kaj interesa.

Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉiuj sanprotektaj aferoj, por eviti pandemiajn danĝerojn. Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan, por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Konstante aktualigataj, ĉiuspecaj informoj pri BET-56 kaj la listo de jamaj aliĝintoj al BET-56, estas en ties retejo:

<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto, kie estas akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo: <https://sezonoj.ru/bet/>

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa Servo <https://eventaservo.org/e/BET-56>





Sur la sama retejo oni povas spekti videofilmeton pri Litovio en Esperanto, legi Informan bultenon pri BET-56, elŝuti aliĝilon kaj uzi emblemon de la aranĝo.

Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu ĉi grava, internacia, esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri la sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj vialandaj naciaj, esperantistaj informkanaloj.

La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila. Partoprenu mem kaj invitu la aliajn. Esperante, ke Vi kaj multaj aliaj esperantistoj partoprenos.

\*\*\*

Povilas JEGOROVAS, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio kaj Prezidanto de Organiza Komitato de BET-56. Poŝtel. +370 687 12219, retroŝto: pjegorovas@yahoo.com.



*Robert Kamiński*

## La plej bona domo de la mondo staras proksime al Kraków!

La novprojektita, privata loĝdomo kun la areo de 362 m<sup>2</sup>, kiu staras proksime al Kraków, estis premiita per la prestiĝa premio *Rethinking the Future Awards*, kiel la sola projekto el la tuta mondo, en la kategorio *rezidejo*. Pro tiu sukceso respondecas, arkitektura oficejo BXB Studio de Kraków, gvidata de Bogusław Barnaś.



Malgrandpolia domo kun ombrejoj<sup>2</sup> (*Małopolska Chata Podcieniowa*) estas domo inspirita de la pola, ligna arkitekturo.

Ombrejoj kiuj foje estas apogitaj per fostoj aŭ kolonoj kreas spacon por ŝirmi kontraŭ pluvo kaj sunlumo. Domoj kun ombrejoj ofte formis la fasadojn de urbaj placoj kaj stratoj, ebligante ĉirkaŭpaŝi parton de la urbo en pluvaj tagoj. En la montaj lokoj, domoj kun ombrejoj sekvis la topografion de la tereno, kreante ŝirmitan ŝtuparon. Interesa ekzemplo de ĉi tiu solvo estas domoj situantaj ĉe la urboplaco en Lanckorona.



Projektante ĉi tiun domon, la arkitekto adaptiĝis al la dispozicio de la loka plano, kiu permesis konstrui nur unuetaĝan domon kun duobla mansarda sub-tegmento. Malgraŭ la limigaj dispozicioj, oni sukcesis krei interesan strukturon de la konstruaĵo.

Oni kreive uzis topografion de la konstruoparcelo kaj en konstruaĵo apartigis kvin mal-samajn nivelojn, kio kongruas kun la loka konstruleĝo kaj estas ene de difino de la duetaĝa konstruaĵo.

La teretaĝo de la enirejo kaj garaĝa enirejo estas ligitaj kun la ekzistanta grundnivelo. Sekve, en taga zono - en la salono - kuirejo kaj

mangôĉambro - la nivelo iomete malaltiĝas, malfermante altajn internojn al bela panoramo. Ankoraŭ pli malalte, rekte sur la nivelo de la grundo, estas la ĉefa salono. En la centra parto de la taga zono, kie troviĝas la kameno, estas kelkŝtupa faŭlto trapikanta la vitran muron, kiu havas eksteran daŭron. La faŭlto en la interno kreas sidlokon, formon de plurnivela aŭditorio aŭ nekutima aranĝo de la gastspaco. Ekster la domo, tio estas nuntempa arkada ŝtuparo, dinamika stilakcento, kiu harmonie ligas la formon de la teretaĝo kun la formo de altiĝanta subtegmento.

La modernisma, plene vitrita teretaĝo, de la sudo estas finpretigita per nature patinita kaj maljuniĝanta ligno, simila al ligno uzita en historiaj domoj. La kontrasta, esprimplena formo de la subtegmento estis finpretigita per moderna

---

<sup>2</sup> Ombrejo – (*pole - podcień*) duonmalfermita, ekstera spaco ĉe la teretaĝo de la konstruaĵo, laŭ ĝia muro, foje limigita per kolonoj, aŭ fostoj.

ferlado, Ruukki Classic. Defluiloj estis diskrete kaŝitaj en la tegmentaj deklivoj kaj eksteraj muroj. La garaĝa pordo estas kovrita per fasada materialo, kiu perfekte kongruas kun la fasado de la domo. En la malferma tagzono, tradiciaj ŝarĝaj fostoj estis eliminataj, anstataŭigante ilin per la ŝtalstrukturo, por krei liberan spacon, vitritan laŭ la tuta longo de la suda fasado.



La premio por preparolita objekto estis aljuĝita fare de profesia konkursjurio, kun-metita de arkitektoj, dizajnistoj kaj artistoj de la tuta mondo, inkluzive Anne Cecilie Haug, Dan Howarth aŭ Chiara Domenici.

*La Rethinking the Future Awards* estas unu el la plej prestiĝaj arkitekturaj premioj de la mondo, premiante la plej bonan arkitekturon, en la mondo kaj estis specife projektita, por engaĝi spektantaron en la arkitekturon.

## Vizitindaj lokoj

*Jadwiga Zakrzewska*

### La kuracado en Cieplice



En la tuta regiono de la montaro Sudetoj, estas multaj lokoj, kie el la tero elfluas varma akvo. Trafluante profundajn rokojn ĝi riĉiĝas je mineralaj komponaĵoj, kiuj havas resanigan efikon. Tiu povo de la fontoj estas konata de centjaroj. Unu el la plej malnovaj kuraĉlokoj en Silezio estas Cieplice Śląskie. La nomo signifas „Varmakvejo”, la temperaturo de la tieaj fontoj estas 44,7 gradoj. Ekde nememorebla tempo,

ĉe la fontoj, kolektiĝis homoj, por uzi resanigan banadon.

Kiam kristanismo alvenis al tiu regiono, la pastroj suspekto rigardis lokajn bankutimojn. Banado en fonto kun la varma akvo?... Odoro de sulfuro en aero? ... hm... Tio devas esti infera afero. Do, apud la fonto, en la jaro 1175, oni starigis

kapelon je la nomo de sankta Johano Baptisto. Ĉar la fonto ne malaperis, oni konstatis, ke videble ĝi ne estas diabla verko, sed ĝi devas esti dia donaco, por helpi malsanulojn. Baldaŭ komenciĝis pilgrimadoj al la mirakla loko. Oni atendis helpon je reŭmatismo, vundaĵoj, virinaj malsanoj, podagro kaj multaj, multaj aliaj sanproblemoj.

En la jaro 1281, la silezia princo venigis monaĥojn, por prizorgi multnombrajn pilgrimantojn. Ekestis monaĥejo, preĝejo, malsanulejo kaj multaj dormejoj. Iom post iom, kreskis la setlejo. Super la fontoj oni konstruis banejon, kovritan de rotondo.

La lokaj kutimoj kaj kuracmetodoj ŝajnas esti strangaj, por la nuntempa kuracado. Dum la tiama banado, regis religia etoso. Post la alveno oni ricevis receptolibron kun necesaj reguloj, specialaj preĝoj kaj psalmoj. Oni banis sin vestitaj per longaj, linaj ĉemizoj, sufiĉe larĝaj, laŭ la dececo. La kuractempo daŭris unu monaton kaj por la bona efiko, oni devis resti en la akvo entute 100 horojn; komence po 2 horojn tage, ĝis 6 horojn. En la akvo je 42 gradoj! Nemirinde estas, ke ne ĉiuj travivis tiun proceduron.

Ni imagu la figurojn blanke vestitaj, subakvigitaj ĝis la kolo kaj kantantaj religiajn kantojn!

Higieno ne estis grava afero. Oni purigis la basenon nur kelkfoje jare, cetere, ĝi estis nature purigata de la trafluanta akvo. Okazis escepto, kiam alvenis eminenta persono. Ekzemple, kiam en la jaro 1687 vizitis la kuraclokon la reĝino Maria, la edzino de la apola reĝo Johano Sobieski, venkinto super turkoj ĉe Vieno. Tiam oni ne nur ĉiutage purigis la banejon, sed ankaŭ enverŝis rozpetalojn.

La doktoro Adalbero Zinder, en sia gvidlibro en la jaro 1665, dediĉis unu ĉapitron por virinoj. “Virina naturo estas malvarma kaj multaj malsanoj de ĝi devenas. Do, la varmaj akvoj estas tre helpemaj kontraŭ virinaj malsanoj. Sed la virinoj devas scii, kiel sin teni dum la kuracado.



Ne decas malmolestaj ŝercoj, kvereloj, klaĉoj. Evidu kalumnii kaj ridindigi forestantojn. Tio estas stultaĵo kaj granda peko.”

Ni povas humure trakti tiujn kuracajn metodojn, sed oni konsentu kun la lastaj frazoj de la kuracisto: klaĉado kaj kalumniado estas aĉa kutimo.

Nuntempe, la kuracloko daŭre evoluas kaj ĝia oferto de kuracaj traktadoj konstante vastiĝas. Krom kuracado, la urbo, Cieplice proponas multajn ŝancojn por agrabla restado. En la tuja proksimeco de la ĉarma malnova urbo, plena de

arkitekturaj monumentoj, troviĝas vastaj kaj mirinde prizorgataj parkoj "Zdrojowy" kaj "Norweski". Banaj gastoj povas pasigi sian liberan tempon promenante kaj vizitante Cieplice kaj la ĉirkaŭaĵon.

## Homoj

*Paweł Nowak*

### Pastro esperantisto Leszek Solakiewicz.



La 15-an de novembro 2021 estas la 30-a datreveno de la morto de la pastro Leszek Solakiewicz (1930-1991), granda iniciatinto de la Esperantomovado en Zagórnik. Li naskiĝis la 2-an de septembro 1930 en Chrzanów, en la, familio de Stanisława kaj Roman Adamczyk (forĝisto). Leszek Solakiewicz edukiĝis en 7-grada bazlernejo, mezlernejo kaj ĝenerala mezlernejo en Chrzanów. En 1950 eniris la Krakovan Teologian Seminarion kaj dum 4 jaroj studis en la Fakultato de Teologio de la Jagelona Universitato. Post fino de la kvara studjaro pro malbona sanstato li devis ĉesigi sian studadon.

Post unujara paŭzo, kiam li komencis kuracadon, en aŭgusto 1955 li estis akceptita en la Palotina Kongregacio en Ząbkowice Śląskie. Tie, la 8-an de septembro, li estis frokigita fare de la provinca episkopo Stanisław Czapla kaj la 8-an de septembro 1956 li faris sian unuan religian profesion. Li finis siajn teologiajn studojn en la seminario en Ołtarzew (1956-58). En 1958 li estis en Gdańsk, en domo ĉe str. Maria Skłodowskiej-Curie. Li titolis sian seminarian verkon "Demandoj de la Kompato de Dio en la Malnova Testamento". L. Solakiewicz faris sian eternan religian profesion la 8-an de septembro 1958 en Ołtarzew por la manoj de Fr. Wojciech Turowski. Li estis ordinita pastro la 11-an de junio 1959 fare de frato Zygmunt Choromański. Ekde 1959, li studis dum unu jaro en pastraj studoj en Gdańsk, kaj jaron poste li komencis studi klasikan filologion en la Fakultato de Humanismo de la Katolika Universitato de Lublin.

La 25-an de aŭgusto 1965 Leszek Solakiewicz aliĝis al la Ĉefdiocezo de Kraków kaj iĝis vikario en Siersza (nun loĝeja kvartalo en la urbo Trzebinia). Post alpostenigo al diocezo en 1967, li estis vikario en Andrychów (de la 20-a de aŭgusto 1967), Komorowice (nun distrikto de Bielsko-Biała ; de la 26-an de junio 1971) kaj Cięcina (de la 1-a de julio 1973). Poste li estis sendita al Inwałd

kaj nomumita rektoro en Zagórnik (la 14-an de junio 1975), kaj en aprilo 1982 tie fariĝis la unua paroĥestro.



Tiam li komencis la konstruadon de la paroĥa preĝejo de Sanktuloj Bartolomeo kaj Luko, komence subtenata de esperantistoj el la tuta mondo (konsekro 1994). La pastro L. Solankiewicz mortis la 15-an de novembro 1991 en Zagórnik kaj la 18-an de novembro li estis entombigita en la loka paroĥa tombejo, kiun li mem fondis.

Lia interesiĝo pri Esperanto daŭris ekde la kvidekaj jaroj kaj en la studenta karto de la Katolika Universitato

de Lublin jam menciis konon de tiu ĉi lingvo. Jam en decembro 1959 li petis la Provincan Estraron permeson partopreni la 45-an Internacian Kongreson de Esperanto en Bruselo en 1960, sed li ne ricevis permeson.

La ideon de Esperanto en Zagórnik enkondukis pastor, kanoniko Leszek Solakiewicz. Li organizis kursojn de tiu ĉi lingvo por infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj. Granda grupo da instruistoj kaj kelkaj loĝantoj ĉeestis la semajnajn lecionojn. En laboro apogis lin instruistino Maria Smaza.

En 1986 en nia vilaĝo okazis la 8-a Internacia Kongreso de Esperanto-Familioj, kiun partoprenis 39 personoj el 12 familioj el 6 landoj. Por la preĝejo oni financis standardon kaj pentraĵon de Dipatrino nomitan „Nia Sinjorino de Esperanto” kun la surskribo "Espera de l' Mondo". Espero signifas esperon, kiun ni ĉiuj portas en la koro; espero je sukceso en ĉiutagaj agadoj, pli bona estonteco, vivi en paco. La pentraĵo ĝisekzistas kaj troviĝas en la malsupra kapelo de la preĝejo. Apud la kapelo troviĝas ankaŭ biblioteko kun libroj en Esperanto.

Esperanto, ĝiaj ideoj efektivigitaj en lernejaj instruplanoj, estis elemento, kiu distingas Zagórnik de aliaj en la lando.

Same kiel Zamenhof, ankaŭ la pastro Leszek Solakiewicz ne strebis amasigi materiajn varojn, sed firmigis en nia konscio la gravecon de universalaj valoroj. Dum 32 jaroj de sia pastreco, li multe dediĉis al Zagórnik. Laŭ lia iniciato estis konstruita preĝejo kaj tombejo. La bazlernejo en Zagórnik ricevis la nomon Ludoviko Zamenhof. Li ankaŭ skribis la tekston de lerneja himno.



Nia Lernea Himno! Vortoj: pastro Leszek Solakiewicz, muziko: Tadeusz Prystacki

1. Subbeskida, pitoreska  
eta nia loko estas.  
Ni Zagórnik, ni Pollando,  
la Patruj' de l' Esperanto.  
Vin el sudo, oriento,  
kaj el nordo okcidento.  
Ni invitas al Polujo,  
per la pano kaj salujo

2. Amikeco, pac', konkordo  
estu nia cel' agordo,  
inspiras nin pli feliĉe  
vivi surtere pli riĉe.  
Multaj estas landoj, maroj,  
multaj inter homoj baroj,  
sed ni kredas, ke estonte  
mond' parolos Esperante.

Ref. Geknaboj, staru al unu rondo,  
por ke floresku pli bona mondo.

Ref. Geknaboj, staru...

Estas la 3-a de junio 1990. La decido farita dum la kunveno de la pedagogia konsilio nomi la lernejon la Ludoviko Zamenhof finfine tiutage efektiviĝis. La unuan fojon estis kantita lernea himno. Al la solenaĵo venis delegacio el Bjalistoko de la lernejo nomita Ludoviko Zamenhof kaj venis delegacio el la partnera lernejo en Krościenko. La ceremonion solenigis ĉeesto de la redaktoro Roman Dobrzyński - aŭtoro de filmoj kaj raportaĵoj el la tuta mondo (ankaŭ pri Esperanto), vicprezidanto de UEA. Li preparis filmon pri ĉi tiu ceremonio. Estis presita speciala eldono de "Gazeta Szkolna" (Lernea Gazeto) en la pola, kaj por gastoj, kiuj ne konis la polan, oni eldonis "Novaĵoj el Zagórnik" en Esperanto. Eĥoj de la ceremonio estis legeblaj en multaj revuoj en la mondo, ekzemple en la "Heroldo de Esperanto" eldonita en Italio. Leteroj de amikoj dezirantaj la plej bonan por la vilaĝo kaj la lernejo venis el la tuta mondo. La lingvoinstruistino, kiu instruis Esperanton en la lernejo, estis s-ino Maria Matejko. Instruistino Władysława Malczyk, ankaŭ, estis popularigantino de Esperanto en nia lernejo.

La gepatra komitato fondis lernejan standardon preparitan laŭ la desegno de instruistoj. La standardo kun la surskribo "Elementa Lernejo je la nomo de Ludoviko Zamenhof" preparita de la Kooperativo de Manfarita Arto en Kraków, malfermas ĉiujn lerneajn festojn.

Memortabulo al la patrono en la lernejhalo projektis bazlernea diplomiginto Janusz Smaza, nuntempe profesoro de la Akademio de Belartoj en Varsovio.

Unu el la stratoj de Zagórnik estis nomita al la pastro Leszek Solakiewicz.

La tago de la lernea patrono estas ankaŭ komuna kristnaska vespero de lernantoj, lerneaj dungitoj kaj gastoj - speciala momento kun unika etoso kun grava eduka aspekto. Ni parolas pri la ideo de interkompreniĝo proksima al la patrono, ni kantas kristnaskajn kantojn en Esperanto, ni dividas oblaton, ni manĝas kune, donante unu la alian la plej varmajn sentojn.

## Lokaj rolvortetoj *Antaŭ* (kaj *malantaŭ*) - 2

### *Antaŭ ol*

En iuj okazoj oni uzas *antaŭ* kune kun *ol*:

- Antaŭ **subfrazo**. *Antaŭ* mem ne estas enkondukilo de subfrazo, sed nur rolvorteto, kaj do bezonas helpon de vera frazenkondukilo.
- Antaŭ **O-vorteca frazparto, kiam verbo estas subkomprenata**. Tiam vere temas pri tuta subfrazo.
- Antaŭ **I-verbo**, ĉar I-verboj estas kvazaŭ subfrazoj.
- ***Antaŭ lia alveno ni manĝis*. → *Antaŭ ol li alvenis, ni manĝis*.**
- ***Mi finos antaŭ ol vi*. = *Mi finos antaŭ ol vi finos*.**
- ***En aŭtuno [...] aperadis la migrantaj birdoj kaj ripozadis sur ĝi, antaŭ ol flugi trans la maron*.**

### *flugi trans la maron*.

### *Malantaŭ*

*Antaŭ* + la prefikso MAL montras pozicion ĉe la mala flanko kompare kun la antaŭa flanko:

- *Tuj **malantaŭ si** ŝi aŭdis viran voĉon*. = *Tuj ĉe sia dorsa flanko ŝi...*
- *La libristo staris sola **malantaŭ la magazena skribtablo***. La magazena tablo troviĝis inter li kaj la magazinaj klientoj, kiuj staris antaŭ la tablo.
- ***Malantaŭ la pordo* oni aŭdis la voĉon de la malgranda Jadvinjo**. La pordo troviĝis inter la aŭskultanto kaj la voĉo.
- *Ni lasu la malfeliĉon **malantaŭ ni***. Temas pri pasinta okazaĵo, kiu kvazaŭ troviĝas dorsflanke de ni.
- *La luno iris returne **malantaŭ la nubojn***. = ...*al pozicio malantaŭ la nuboj*.
- *Ŝi prenis ankoraŭ **el malantaŭ la forno** faskon da lignetoj*. = ...*el pozicio malantaŭ la forno...*

*Malantaŭ* neniam havas tempan signifon. Anstataŭe oni uzas *post*. Ankaŭ kiam temas pri sinsekvo, oni uzas nur *post*. Oni ne diras ekz.: *\*Li erare metis la finaĵon N malantaŭ tiu vorto*.<sup>\*</sup> Tio signifus, ke la N estus kaŝita, ĉar vorto estus skribita sur ĝi. Oni diru: ...*post tiu vorto*.

### **Vortfarado**

- *Antaŭ(aĵ)o, malantaŭ(aĵ)o* = “(mal)antaŭa flanko/parto (en loka senco)”: *Kaj de la **antaŭo** de la pordego de la eniro ĝis la **antaŭo** de la interna portiko de la pordego estis kvindek ulnoj. Iliaj haroj [...] kunvolvitaĵoj sur la **malantaŭo** de la kapo en formo de bulo, pendis senorde sur la malgrasaj koloj*.

Ĝi [= la ligna bildo] devis prezenti la Danon Holger kaj estis destinita por ornami la **antaŭajon** de ŝipo.

- **Antaŭe** = 1. “en pozicio antaŭ io (en sinsekvo), pli frue”: *La juna knabino [...] iris **antaŭe**. **Antaŭe** iris kantistoj, poste kordinstrumentistoj. Kiam vi vidis nin en la salono, li jam **antaŭe** diris al mi la veron.. “ĉe la antaŭa flanko” (malofta uzo): Liaj vestoj estis broditaj **antaŭe** kaj malantaŭe.*

- **Malantaŭe** = “en loko malantaŭ io, ĉe la malantaŭa flanko, en pozicio malantaŭ io”: *Ili ĉiuj tri devis sidiĝi **malantaŭe** [en la veturilo], kaj al tio ankoraŭ sur ligna kesto kun fera garnajo. Ĝi estis la lasta en la vico, kaj baldaŭ ĝi restis je granda distanco **malantaŭe**. Mi alpinglos **malantaŭe** la tuketon.*

- **Antaŭen, malantaŭen** = “al la (mal)antaŭo”: *Ilia vizaĝo estis direktita **antaŭen**. Nia afero regule kaj trankvile iras **antaŭen**. (= ... progresas.) Ŝi falis **malantaŭen**. Ne rigardu **malantaŭen** kaj haltu nenie en la tuta ĉirkaŭajo.*

- **Antaŭa** = “troviĝanta antaŭe, ĉe la antaŭo, pli frua”: *La ĉevalo levis siajn **antaŭajn** krurojn. / Li reiris sur sian **antaŭan** lokon. Mi faros en Ĝenevo nenion sen **antaŭa** konsiliĝo kun vi.*

- **Malantaŭa** = “troviĝanta malantaŭe, ĉe la malantaŭo”: *La nigra hundeto [...] leviĝas supren sur la **malantaŭaj** piedoj. La studento eniris tra la **malantaŭa** pordo.*

## Literaturaĵoj

La 30-an de novembro pasis jam la 81-a datreveno de la morto de Mark Twain (originale Samuel Langŝorne Clemens), verkisto, vaste konata en la mondo, devenanta de Skotlando, atentata kiel unu el la patroj de la usona literaturo - fama precipe, pro siaj libroj por junularo, krom tio satiristo, humoristo, ankaŭ masonisto.

Okaze de la proksimiĝanta Kristnasko, ni proponas legi lian groteskon „La Homo” (la traduko al Esperanto jam sufiĉe malnova, sed ni, bedaŭrinde, ne konas la tradukinton), kiu permesos gajigi la tempon kaj iom pensi, ĉu nia nuna bildo pri “la homo” estas multe alia ol tiu de M. Twain?

*Teresa Nemere*

*Mark Twain*

### La Homo

La homo ne povas dormi sub libera ĉielo; ĉar tie li malvarmumus ĝis la morto aŭ estus prenata de reŭmatismo. Li ne povas teni sian nazon pli longe

ol unu minuton sub akvo sen droni. Li estas - permesu tion diri! - la plej mizera kaj plej senhelpa el ĉiuj kreitaĵoj surloĝantaj la Teron.

Oni devas lin dorloti kaj vindi en tukojn, por ke li komence povu vivi. Li estas delikata aĵo, vera Brita Muzeo de malperfektaĵoj. Tial li bezonas konstantan riparadon. Maŝinon tiel difektan kiel li, neniu aĉetus. Ŝajnas, ke la bestoj malpli altaj naskas siajn dentojn sen doloro kaj sen malagrablaj sentoj. Sed tiuj de la homo traboras sin post monato de kruelaj torturoj kaj en la tempo, kiam la homo malplej multe estas kapabla elteni tiajn torturojn. Sed kiam li posedas ĉiujn dentojn, jam estas necese eltiri ilin. La dua garnituro ja restas kelkan tempon, sed vere fidindan garnituron nur fine faras la dentisto.

Estante infano, la homo komencas esti malsana kaj tio restas lia regula ludo ĝis la fino. Parotidito (apudorela ŝvelo), skarlatino, kokluŝo, kataroj, tonsilito kaj diferito estas por li tute naturaj aferoj.

Poste, en la plua paŝo de la vivo, lin ĉiam minacas nazkataro, tuso, astmo, bronkito, influenco, angino, tuberkulozo, blindiĝo, flava febro, furunkoj, pulminflamo, paralizo kaj mil aliaj malsanoj de tiaj aŭ aliaj specoj.

Li estas korbo plena de pesta putraĵo, azilo kaj manĝejo por mikroboj. Rigardu kelkajn detalojn de tiu ĉi faritaĵo.

Por kio li posedas la cekumon? Ĝi havas neniun valoron. Ĝia unika tasko estas kuŝi en la ventro, atendi iun erarintan vinberkernon kaj poste kaŭzi suferojn.


Por kio servas la barbo de l' homo? Ĝi estas nura ĝenaĵo. Ĉiuj persekutas ĝin per razilo. Sed la naturo ĉiam denove kreskigas ĝin, anstataŭ transigi ĝin sur la kapon de l' homo.

La homo deziras konservi sian kaphararon. Ĝi estas bela ornamo, la plej bona ŝirmilo kontraŭ la vetero, kaj la homo ĝin ŝatas pli ol smeraldojn kaj rubenojn. Dum la unua duono de la vivo la naturo ja permesas al ĝi kreski, sed ĝi ne emas resti.

La homo eĉ ne estas bela. Rilate al lia korpo - rigardu la bengalan tigron, tiun enkorpigon de ĉarmo, korpa perfekteco kaj majesteco!

Rigardu la leonon, la gazelon, la leopardon - kaj poste rigardu la homon - tiun mizeran ulon, tiun animalon kun peruko, aŭdotubo, la vitra okulo, la porcelanaj dentoj, la ligna gambo, la arĝenta trakeo - tiun kreitaĵon, flikitan de sube ĝis la supro!

Mark Twain. Foto Vikipedio



## Metiistoj

Iam servis pri ĉio  
Aparta metio.  
Ŝuojn faris ŝuisto,  
Tablojn – lignaĵisto  
Vestojn tajloro,  
Sed de aliuloj laboro  
Estis: forĝado,  
Muelado,

Panbakado...  
Unu masonis domojn,  
Alia kultivis legomojn...  
Longega estis listo  
De metiistoj.  
Kaj je la fino  
Ĉion produktas... ĉino.

## Saĝulaj pensoj

Paŭlo S. Viana

### Streso kaj blankaj haroj



De longa tempo homoj atribuas al longdaŭraj psikaj suferoj blankiĝon de haroj. En la angla lingvo, blankaj haroj estas nomataj “lumoj de streso”. La plej fama aludo al tio estas la onidiro, ke la haroj de la franca reĝino Antonieta tute blankiĝis dum unu nokto, dum kiu ŝi atendis la ekzekuton sub gilotino. Probable, tio estas nur onidiro. Sciencistoj ĝis nun ne povis pruvi la rilaton inter la persona streso kaj ŝanĝoj en la harpigmentoj.

Tamen, danke al la novaj esploroj en la Universitato de Columbia en Novjorko, oni venis al la konkludo, ke tiu rilato almenaŭ parte ekzistas. Esploristoj mezuris koloroperdon de izolitaj homaj haroj de volontuloj, kiuj verkis tagnotojn, por dokumentado de siaj ĉiusemajnaj niveloj de streso. Pere de detalaj skanografadoj, ili kaptis bildojn de tre malgrandaj fragmentoj de haro, kiuj respondis al kreskado dum unu horo. Kiam la koloro de tiu haro ŝanĝiĝis, la esploristoj trovis en ĝi novan variadon de 300 proteinoj. Dum certa tempo, tiuj ŝanĝoj povis normaligi, se la stresa situacio ĉesis, precipe ĉe junaj homoj.



Ekzemple: dusemajna libertempo de iu volontulo revenigis la antaŭan koloron de liaj haroj. La ŝanĝo en la koloro de haroj ne okazas en la ekstera, videbla parto, sed kiam la haro estas ankoraŭ produktata en la saketo, trovebla en la haŭto, en tiel nomata "har-foliklo". Krome, blankaj haroj estas forte influataj de genetikaj faktoroj.

Efektive, multobliĝis lastatempe la studoj kaj interesiĝoj pri influo de streso je la homa sano. Dum la monato julio 2021, tiu temo estis la plej serĉata de medicinistoj en la faka retejo medscape.com. Dum la kronviroza pandemio, la nivelo de mensa streĉiĝo konsiderinde kreskis en la mondo. Enketoj montris, ke multaj homoj drinkis pli multe ol kutime. Krome, ankaŭ san-profesiuloj suferis tion pli ofte kaj pli intense.

Aliaj studoj, sur ĉi tiu kampo, inkluzivis epidemiologiajn datumojn pri homoj kaj bestoj, kiuj montris, ke longdaŭra streso, kune kun genetikaj faktoroj, povas faciligi la aperon de Alzheimer-Morbo.

Aliflanke, studoj pri akupunkturo montris, ke ĝi malpliigas la "citokinan" ŝtormon, en tia situacio, kaj sekve ĝi mildigas inflamon, plibonigas la imunsistemon kaj la nervan sistemon.

## Leterkesto



*Katalin Kovats*

### Helpu al edukado.net - naskiĝtaga mesaĝo

Precize post 20 tagoj, la 15-an de decembro, estos edukado.net 20-jara.

Esti dudekjara, por retejo, signifas esti maljuna, kun limigitaj kapabloj, esti malfleksa kaj apenaŭ evoluigebla. Edukado.net bezonas esti rekonstruata.

Katalin Kovats, la redaktorino, per filmita mesaĝo, turnas sin al la membroj, por ekscii pri la paĝaro iliajn opiniojn, kiujn oni povas esprimi per mesaĝoj, komentoj en la Gastlibro aŭ plenigante la tiuteman enketilon. La informoj helpas al la redaktoro kaj al ESF, la plej granda sponsoro de edukado.net, en la decidoj pri la estonteco de la porinstruista retejo.

Pliajn detalojn kaj ligilojn al la filmo kaj enketilo, vi povas trovi ĉe la paĝo: <https://edukado.net/novajhoj?id=861>

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net.





Proksimiĝas la Zamenhofa Tago. Okaze de tio mi havas du novaĵojn. Mi ĵus trovis:

*Instytut Zamenhofa* (esperantlingve - Zamenhof-Instituto) – la unua amaskomunikila pensfabriko en la Mez- kaj Orient-Eŭropo, establita en marto 2020. Zamenhof-Instituto estas sendependa, ne-registara organizaĵo por esplorado, kreado de analizoj kaj formado de publikopinio.

La Instituton kreas kompetentuloj: homoj de amasinformiloj, ĵurnalistoj, sciencistoj, fakuloj pri komunikado. La leĝa formo de la Instituto - fondaĵo.

Sur la retpaĝo de la Instituto oni skribis: “La patrono de la organizaĵo estas Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la lingvo Esperanto, okfoje nomumita por la Nobel-premio pri paco”. Ĉefa retpaĝo, la Instituto citas la fragmenton de la parolado de L. Zamenhof dum la inaŭguro de la Dua Kongreso Esperantista en Ĝenevo, 1906 (la 2-a UK): “*Rompu, rompu la murojn inter la popolojn*”. La markemblemo de la Instituto enhavas la kopion de la subskribo de L. Zamenhof. La retpaĝo de la Instituto estas: <https://zamenhof.pl/zamenhof.pl>

*Laŭ la Reta Vortaro PIV: Pensfabriko estas privata asocio aŭ fondaĵo, kiu studas sociajn kaj politikajn temojn kaj pri ili publikigas raportojn, rekomendojn.*



*Angle (laŭ Vikipedio: think tank; ankaŭ: Public Policy Institution, PPI, do Publikinteresa Instituto).*

<https://pl.linkedin.com/company/instytut-zamenhofa>

La alia ZEO. La nomon “Zamenhof” havas la studenta domo n-ro 4 de la Varsovia Universitato, situanta ĉe la L. Zamenhof-strato 10A en la kvartalo Muranów. Pole: *Dom Studenta Nr 4 „Zamenhof”*. <http://bss.uw.edu.pl/sekcja-socjalna/domy-studenta/ds4/>

Aldone indas mencii pri la *zamenhof.info* – speciala, enhavriĉa retejo en 18 fremdaj lingvoj, dediĉita al L. Zamenhof, kreita de la aktiva internacia neregistara junulara organizaĵo *Edukado@Interreto (E@I)*, kies sidejo estas en Slovakio. La ĉefa celo de la retejo estas prezenti Ludovikon Zamenhof, lian laboron, verkaron kaj filozofion.

*Jerzy Dryja*



*Magdalena Tatara*

## ILEI - membrokotizoj kaj abonoj 2022

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - Pola Sekcio invitas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri instruado de Esperanto kaj pri progresado en la lingvo, membriĝi al ILEI

60 zl. – membrototizo de ILEI kun papera *Internacia Pedagogia Revuo*

30 zl. – membrototizo de ILEI kun reta aliro al *IPR*

IPR estas inkluzivita en la membreco.

65 zl. - abono de *Juna Amiko (papera)*

35 zl. - abono de *Juna Amiko (reta)*

SUPERA MEMBRO de ILEI - 105 zl (anstataŭ 125 zl)  
(papera IPR kaj papera JA en la sama koverto)

**LIMDATO:** la 31-a de decembro 2021

Daŭrigo sur la paĝo 40

## Kalendaro de Esperanto-aranĝoj

### Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2021 kaj 2022

11.2021	<i>Glivicea Rendevuo de Praktikantoj kaj Uzantoj de Esperanto GRUPE 2021</i>	PEA-filio en Gliwice <i>nuligita</i>
11.12. 2021	Recita konkurso "Vortbeleco en Esperanto" en Góra. Okazis en reta formo.	Eŭropa Centro de Interkultura Edukado www.ecem.com.pl, informado.eo@gmail.com
10-12. 12.2021	22-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj	Bjalistoka Esperanto-Societo
28.12. 2021 04.01.22	13-a Junulara Esperanto-Semajno <i>JES en Wittenberg (Germanio)</i> <i>Nuligita</i>	<i>Pola Esperanto-Junularo</i> <i>Germana Esperanto-Junularo</i> www.pej.pl
10-22.6. 2022	44-a Ĉebalta Esperantista Printempo En Mielno-Unieście	Pola Esperanto Asocio, Filio en Gliwice, Stanisław Mandrak, 44-114 Gliwice, ul. Kormoranów 16/5 stanislaw.mandrak@gmail
23-26.06. 2022	39-a Pola Esperanto-Kongreso en Łódź	Pola Esperanto Asocio Ĉefa Estraro, rk-lodzo@wp.pl

### Universalaj Kongresoj de UEA

17-24.07. 2021	La 106-a Universala Kongreso de Esperanto en Belfasto (Nord-Irlando) okazis en virtuala formo (2-a Virtuala UK)	Universala Esperanto-Asocio uea.org
-------------------	---	--

6-13.08. 2022.	La 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado). En 2020 okazis nur virtuala kongreso.	Universala Esperanto-Asocio uea.org
29.07- 5.08. 2023	La 108-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Torino (Italio)	Universala Esperanto-Asocio uea.org

## Elektitaj renkontiĝoj en najbaraj landoj

11-12. 12.2021	Zamenhof-tagoj 2021 kaj 56-a kongreso de Litova Esperanto-Asocio en Kaunas	Litova Esperanto-Asocio en Kaunas pjeorovas@yahoo.com
9-17.07. 2022	56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56) en Klaipėda, Litovio	Litova Esperanto-Asocio litova.ea@mail.lt, anasturte@gmail.com, <a href="http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56">http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56</a>

## Diverse, facile, bonguste

Ĉi-foje ni ricevis recepton de belgio senditan de Bert Boon.

### Gratenita supo kun blankigita cikorio

*Ingrediencoj (por kvar personoj):*

- 12 blankigitaj bruselaj cikorioj
- 8 decilitroj da birdaĵbuljono
- 4 tranĉaĵoj de tosto
- fromaĝo raspita
- butero
- pipro, salo kaj muskato



*Preparmaniero:*

- purigu la blankigitan cikorion, forigu la amaran kernon kaj distranĉu la legomon
- fritu la cikorion en butero, ĝis ĝi iĝas orflava kaj surverŝu ĝin per la buljono
- Spicu kaj boligu dum 15 minutoj sur duonvarma kuirplato (regule senŝaŭmigu la supon!)

- Disdonu la supon en fajreltenajn pelvetojn, metu en ĉiun perlveton tranĉaĵon da tosto, ĵetkovru per fromaĝo kaj gratenu en forno

## Oni eldonis

*Valentin Melnikov*

### Legu kaj ridu!

Roman Dobrzyński estas konata kiel aŭtoro de kelkaj libroj pri la familio de Zamenhof. Bedaŭrinde, krom la fama “Zamenhof-strato”, tradukita al pluraj lingvoj, la libroj restis nerimarkitaj de recenzistoj-kritikistoj. Plie, li kreas dokumentajn filmojn pri Esperanto. Sed krom tio li verkas etajn humuraĵojn, prilingvaj kaj primovadaj.

Ĝus aperis “Verda Simio” – la kolekto de humuraj rakontoj kaj epigramoj. El la prefaco ni ekscias, ke tiun titolon havis varsovia Esperanta kabaredo, fondita en 1958. Nu jes, tuj neeviteble aperas paralelo kun “Verda Kato” de Raymond Schwartz – kaj ne senbaze.

La dorskovrila teksto, verkita kvazaŭ de verda simio (videbla surfote), asertas: “homo (...) pretendas montri sin la plej evoluinta primato. Vane! Per tia truko la homo ne sukcesos falsi la fakton, ke li estas plu simio, nur malpli valora. Li provas kamufli sian devenon, nomante sin, en la morta latina lingvo, homo sapiens. Ne sufiĉas nomi sin saĝa, por esti tia.”

La unua rakonto en la libro, “Maldikigi vortaregojn!”, ricevis premion en Belartaj Konkursoj de UEA, en 2019 kaj do aperis en “Belarta rikolto 2019”. Ĝi traktas la temon jam esploritan de R. Schwartz, kaj eĉ uzas similan formon – parodian prelegon antaŭ akademiaj moŝtuloj.

La sekvaj rakontoj de R. Dobrzyński, el la unua libro-parto “Simiado”, estas plejparte monologoj aŭ skeĉoj, iam prezentitaj en la kabaredo (1958-1964). Ili spirite proksimas al verkoj de liaj karmemoraj samlandanoj – Czesław Kozłowski, Jakobo Ŝapiro, Izrael Lejzerowicz. Li karikaturas strangaĵojn en Esperanto-movado, ties problemojn, ofte memkreitaj, konduton de iuj “samideanoj”. Vere, malmulto ŝanĝiĝis dum lastaj cent jaroj. Priskribataj situacioj estas preskaŭ ĉiam absurdaj kaj do ridindaj. Iam dekomence nekompreneblas, kial la aŭtoro elpensis tion – kaj nur lastfrazo klariĝas la kaŭstika, sed trafa alegorio (“Kial kvarpiede?”).

Certe ne ĉiuj eroj estas egale brilaj. Ie-tie, por kompreni spriton, oni devas koni vivon en socialismaj ŝtatoj (ne nepre en Pollando, ja vivkondiĉoj kaj kutimaĵoj estis ĉie pli-malpli samaj). Tamen, “Leteron al samideano” komprenos



ĉiuj – simple nun ĝi venus el alia mondeparto... Ie-tie la ŝercoj povas ŝajni tro krudaj – tamen, la gustoj diversas...

Iuj situacioj estas “vagantaj”, jam priskribitaj de aliaj aŭtoroj – ekz., mi tutcerte iam legis humuraĵon pri arda disputo inter esperantistoj, ĉu nomi novan straton “Zamenhof” aŭ “Esperanto”, kaj fine la strato ricevis nomon sen rilato al nia lingvo; sed mi tute ne memoras la aŭtoron kaj titolon. Kaj “Verda rano” estas nur rerakontita “Tre moderna fabelo” de F. Szilágyi.

La dua parto estas “Gramoj da epigramoj”. 2-4-liniaj miniaturoj plaĉos al tiuj, kiuj ŝatas similaĵojn de Poul Thorsen. Akraj, trafaj, iam maldecetaj, mokantaj eventojn el E-movado kaj en la vivo ĝenerale. Sekvas similtaj tradukaĵoj, 4-liniaj miniaturoj (aŭ eble fragmentoj) de polaj aŭtoroj el diversaj epokoj kaj skoloj, de renesanco ĝis nun. Ankaŭ tiuj eroj, kiel mi komprenis, iam sonis en la kabaredo.

La tria parto, “Vivo estas kabaredo”, konsistas el priskriboj de realaj okazintaĵoj, foje tre ridindaj. Ja averaĝa esperantisto havas pli interesan kaj buntan vivon ol averaĝa neesperantisto – pro vojaĝoj tra la mondo, kontaktoj kun alilandanoj. Dum jardekoj la aŭtoro certe spertis multon. Kaj eĉ se li aldonis iomete da fantazio por plia humurigo – ni pardonu al li...

La aŭtoro konfesas, ke la libro aperis dank’al kronvira pandemio: devige izolita hejme, li “rememoris pri bretoj kaj tirkestoj, kiuj okupas milojn da flaviĝintaj paperfolioj. Mia arkivo verŝajne neniam estus fosita, se ne eksplodus la pandemio”.

Do rezultigis la bona legolibro por progresantoj, alloganta al E-komunumo kaj kulturo, iom pensiga kaj multe gajiga.

## Forpasis

La 4-an de novembro 2021 en Bjalistoko forpasis longjara membro de la Societo, esperantisto, **Mikołaj Prokopowicz.**

La entombigo okazis la 7-an de novembro sur la ortodoksa tombejo

ĉe la str. Wysockiego en Bjalistoko.

Kun granda malĝojo, Bjalistoka Esperanto-Societo



Mikołaj Prokopowicz en la rolo de Ludoviko Zamenhof

## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

### **9-aj Esperantaj Tagoj de Staszów 24-28.05.1995j, Ripoza renkontiĝo 20-24.05.1995j, AIS sesio 24-28.05.1995j.**

Inter 20-a kaj 28 de majo la jaro 1995 j okazis samtempe tri aranĝoj. Ripoza renkontiĝo, Esperantaj Tagoj de Staszów kaj AIS-sesio

La aranĝon organizis loka Esperanto-Klubo kun la Kulturdomo de Staszów.

La loĝado kaj tuta restado estis en la ripozdomo Chańcza, ĉe artefarita lago.

En la kunvenoj partoprenis 96 personoj el Pollando kaj gastoj el Francio, Germanio, Australio, Kanado, Svislando kaj Aŭstrio. Kurson por komencantoj gvidis Renata Macyszyn. Dum la aranĝo prelegis: Stanisław Swistak (seminario UNESCO kaj UEA), Andrzej Grząbowski, Lidia Ligeza, Tyburcjusz Tyblewski, Antoni Golonka, Remigiusz Mielcarek, Zofia Banet-Fornal (teatro centjara), Michel Duc Goninaz, Józef Woźniczka, Kazimierz Strzelecki, Lidia Ligeza, Rudiger Sachs.

Artan programon plenigis: Monodramo „Wolfgangerl” - Jerzy Fornal, Koncerto de Jadwiga Dzięgielewska, kaj koncerto de Georgo Handzlik

Dum sesio de la Akademio Internacia de Sciencoj en Staszów lekciis profesoroj; Michel Duc Goninaz, Józef Woźniczka, Kazimierz Strzelecki, Lidia Ligeza, Rudiger Sachs, Tyburcjusz Tyblewski, Remigiusz Mielcarek. Post la fino okazis ekzamenoj.

Okazis ankaŭ ekskursoj al proksimaj interesaj lokoj: monahejo en Rytwiany el la jaro 1621, al Ujazd kun kastelo el la 17-a jarcento, al la kuraĉloko Busko-Zdrój kun belega parko kaj al Szydłów kun mezepoka reĝa kastelo kun imponaj kontraŭbatalaj muroj.

En memorlibro R. Sachs skribis:

„Sub deko da verdstelaj flagoj,  
floras ripoziĝo kaj studo,  
Jen nia lingvo ne nur ludo!!  
Memoro certe longe restas.  
La dank’ de ni elkora estas,  
Christine kaj Rudiger Sachs.”



Rudiger Sachs  
kun  
Tyburcjusz  
Tyblewski



Renkontiĝo  
kun Józef  
Wozniczka



Gastoj en  
ĉefsalono



Jerzy Fornal dum la Monodramo „Wolfangerl”



Lidia Ligeza



Remigiusz Mielcarek dum AIS-sesio



Koncertas Jerzy Handzlik

***Saĝulo scias ion, sed neniŭ scias ĉion***



Robert Kamiński

Inspiritaj de la enhavo de la reta Esperanto-Arkivo, ni decidis, en la ĉapitro Esperanto-gazetaro, mallonge prezenti la nunajn Esperanto-gazetojn kaj periodaĵojn. Kelkaj el ili estas eldonitaj surpapere, aliaj nur en la cifereca formo. Ni ofte ne scias pri ilia ekzisto. La eldonaĵoj prezentas diversajn interesiĝojn kaj pasiojn de esperantistoj kaj indas konatiĝi kun ili, ĉar ili estas heredaĵo de la Esperanto-kulturo.

Ni invitas vin konatiĝi kun Esperanto-revuoj, kiuj povas malkovri novajn interesajn kampojn de aktivado kaj certe povas pligrandigi niajn scion.

Hodiaŭ, helpe de la teksto de Bert Boon, ni prezentas la periodaĵon "Esperanta Numismatiko", kiu estas la organo de la "Esperanto-Numismatika Asocio".


Por ricevi la senpagan ciferecan numeron "EN", n-ro 4/2021, bonvolu kontakti kun Bert Boon aŭ kun la redakcio de Pola Esperantisto.

## „Esperanta Numismatiko”

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis nun kompleta manko de tia projekto, en 2013, estis fondita la ununura en la historio de Esperantomovado numismatika fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun la revuo “Esperanta Numismatiko”.

La instiga kialo estis la konstato, ke la Esperanta trezoro de moneroj kaj medaloj en Esperantujo estas apenaŭ konata, aŭ tute ne, eĉ en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute





malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke Esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. La kroma celo estas eble plej baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 148 individuaj membroj kaj 23 esperantistaj (kaj eĉ neesperantistaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos, kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. Sekve SENPETE vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare). Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj, Bert Boon, bert.boon@skyne.be  
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

## Zamenhof/Esperanto-Objekto

*Robert Kamiński*

### Zamenhof/Esperanto-Objektoj en Pollando - 6

Ekde la apero de la internacia lingvo Esperanto, pasis 133 jaroj. Jam dum la vivo de ĝia kreinto, esperantistoj en la tuta mondo honoris lin, nomigante stratojn per la nomo de Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kaj post la morto de la Majstro aperas en la tuta mondo tiaj monumentoj, placoj, parkoj, memortabuloj, ŝipoj, kaj eĉ astroidoj. La kreskanta Esperanto-movado sammaniere honoras ankaŭ aliajn aktivajn membrojn.

Ankaŭ en Pollando - patrujo de Esperanto, ekde la jaro 1919, aperas diversaj objektoj kun nomoj kunligitaj kun L. Zamenhof kaj E-movado. La impona nombro de ili konstante kreskas. La sube prezentita listo montras ĉiujn, ĝis nun registritajn, tiuspecajn objektojn en Pollando. Mi volas prezenti la polan ZEO-liston en la sekvaj ses numeroj de „Pola Esperantisto“.

Mian registradon de ZEO en Pollando mi komencis en la jaro 1996. Registradon de ZEO-j en la mondo komencis *Hugo Röllinger*, per la libro „Monumente pri Esperanto - ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-Objektoj, en 54 landoj”, kiun eldonis UEA en 1997. Ekde

tiu jaro mi serĉas kaj registras ĉiujn objektojn, dediĉitajn al nia majstro kaj Esperanto-movado.

Ni kune kompletigu kaj korektu la liston. Se vi trovos novan, ne registritan ZEO-n, aŭ se vi havas pli detalajn informojn pri ĝi, bonvolu kontakti min. Jen mia retadreso: rk-lodzo@wp.pl. Vi ankaŭ povas viziti la fejsbukan retpaĝon pri ZEO: <https://www.facebook.com/groups/128827667179539>.

Ĉu vi memoras kaj zorgas pri ZEO en via ĉirakŭaĵo? Kontrolu, ĉu ĝi ekzistas. Purigu la tabulon, metu florojn ĉe la monumento (eĉ artefaritajn). Montru, ke ekzistas homoj, por kiuj ĉiu ZEO estas grava.

N-ro	Situo	Objekto	Ekzistas de la jaro
212	Warszawa, 128 parkejoj en la urbo, pli ol 2000 bicikloj	„Veturilo“ - E-nomo de urba pruntoptrenejado de bicikloj	01.08.2012
213	Warszawa, tombejo „Komunalny Północny”, str. Kazimierza Wóycickiego	Tombo de esperantisto Jerzy Fornal, kw. S-X-4, rząd (vico) 15, grób 41	31.08.2013
214	Warszawa, str. Obozowa 60	Lerneja sporta klubo „Esperanto“	
215	Warszawa, str. Smolna 36	Klubo-kafejo drinkejo LOKO <a href="http://www.lokobar.pl">www.lokobar.pl</a>	
216	Warszawa - reto de veganaj manĝejoj	“Manĝo” - Vegan Street Food str. Źelazna 58/62, str. Koszykowa 61, str. Dobra 53, str. Bracka 20,	2020
217	Warszawa, str. Powązkowska 14	Tombo de Antoni Grabowski kun priskribo de lia E-agado, sektoro. Ł., vico. 5, tombo 25,26	1921
218	Wieluń	Zamenhof-strato	?
219	Wrocław	Odo Bujwid-strato	
220	Wrocław, kv. Huby	Zamenhof-placo	1961
221	Wrocław, str. Kuźnicza 43/45	Tabulo pri Antoni Grabowski	2003
222	Wrocław, str. Rynek 50	memortabulo dediĉita al fondintoj de la unua postmilita esperantista organizo en Vroclavo	17.12.2008 16.00 horo
223	Zabrze, kv. „Rokitnica”	Zamenhof-strato	?
224	Zabrze, preĝejo al s-ta. Jozefo str. Roosvelta 102	Simbolo de IKUE en kapelo al Maksymilian Kolbe	1973
225	Zabrze, tombejo św. Józefa (sektor H I rząd 1, miejsce 92)	Esperantliga surskribo sur tombo de pastro Henryk Paruzel	17.01.1977
226	Zagórnik, (apud Andrychów), ĉe la str. Szkolna 12	Zamenhof-lernejo	1990
227	Zagórnik, ĉe la str. Szkolna 12	Tabulo pri Zamenhof kaj Esperanto	1990

228	Zagórnik, en preĝejo al sankta Bartolomeo, str. Inwałdzka5	Pentraĵo - Dipatrinio kun esperantlingva surskribo „Espero de l' Mondo”	1986
229	Zamość	Zamenhof-strato	?
230	Zdrojowa Góra (apud Piła)	Arbaro de esperantistoj, tabulo	1974, 05.12.2009
231	Zduńska Wola, kv. „Osiedle Południowe”	Zamenhof-strato, 51.592264, 18.928167	?
232	Zielona Góra	Zamenhof-Strato	1961
233	Zielona Góra – Warszawa Vojo foje ŝanĝiĝas en sekvaj horaroj	Trajno Zamenhof - IC 71100	2009, 2015
234	Elbląg,	Zamenhof skvaro	25.11.2014
235	Warszawa, <a href="https://zamenhof.pl/">https://zamenhof.pl/</a>	“Instituto-Zamenhof” amaskomunikila pensfabriko	2020
236	Warszawa	Studenta domo n-ro 4 “Zamenhof”	?

Zamenhof-strato  
en Góra ←

Zamenhof-  
monumento en  
Jelenia Góra ←

Zamenhof-strato  
en Lublin ↓

p. 40

Fragmento de  
Z-monumento en  
Koszalin

Ponto Esperanto  
en Bydgoszcz





Zbigniew Kornicki

## Ni invitas al Esperanto-renkontiĝoj

Post pli ol unujara paŭzo, ni rekomencas Esperanto-renkontiĝojn en la Klubo „Kraĝ” en Poznań, en kies gastamaj muroj agis subtenantoj de la lingvo Esperanto dum preskaŭ 40 jaroj. (iniciatis ĝin en februaro 1983 B. Wierzejewski, la vicprezidanto de PEA-filio en Poznań).

La 16-an de novembro 2021, je la 18-a, en la klubejo ĉe la str. Dmowskiego 37, okazis la unua renkontiĝo.

En la programo estis: kalendaro de Esperanto-aranĝoj kaj renkontiĝoj en la venonta kvaronjaro, libroprezentoj, novaĵoj el "Pola Esperantisto" kaj el "La Ondo de Esperanto", informoj pri la planata, venontjara Esperanto-kurso kaj trarigardo de filmkolekto de Roman Dobrzyński.

Ni prezentis faktojn el la historio de la Esperanto-movado, surbaze de la kolekto de datoj kompilitaj de Ulrich Lins en "Cent Jaroj de Esperanto", ni diskutis pri sugestoj por la programo kaj dato de la venonta kunveno.

Se estas sufiĉe da gastoj, Esperanto-renkontiĝoj de la Klubo „Kraĝ” okazos ĉiumonate.

**KLUB OSIEDLOWY „KRAĜ”**



[www.klubkrag.pl](http://www.klubkrag.pl)







PEJ-anoj en sidejo de Toronto en Sopot



Esperanto sur Strando en Sopot 2021





Pola Esperanto-Asocio  
Polski Związek Esperantystów

faniMani.pl

KRS:  
0000507234

CEL:  
22781

# Dziękujemy za Twój

# 1%



Wspieraj nas kupując przez **FaniMani.pl**  
1500 sklepów internetowych do wyboru!



Komuna foto dum triobla aranĝo en Staszów - majo 1995